"NESKUEBLA FIDO ESTAS NUR TIU, KIU POVAS REKTE RIGARDI LA RACION EN ĈIUJ AĜOJ DE LA HOMARO"
Allan Kardec

Esperanto-Aldono

OFICIALA ORGANO DE "GRUPO ESPERANTO KAJ FRATECO"

"Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
Ni semas kaj semas konstante."
L. L. Zamenhof

2-a Jaro — BAGÉ, Septembro 1965 - Rio Grande do Sul - BRASIL (Brazilo) — N-ro 4

DIZERTINTOJ

Dizertintaj mediumoj estas ne sole tiuj, kiuj ne transdonas kun fideleco signojn kaj vortojn, avizojn kaj observojn el la Spirita Sfero al la Fizika Sfero.

De estulo al estulo fluas la vivo, kaj ni ĉiuj, enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj de iu ajn kondiĉo, estas kunvokitaj por lukti por la venko de la Eterna Bono.

Dizertintoj estas same:

Tiuj, kiuj amasigas la panon, sen justa profito, transformante cerealojn en senespriman monon;

tiuj, kiuj predikas religiajn kaj sociajn virtojn, sin kaŝante en remparo de uzuro;

tiuj, kiuj fermas lernejojn, malfermegante arestejojn;

tiuj, kiuj transformas la ŝlosilojn de la Scienco en orajn hokmalfermilojn;

tiuj, kiuj konstruas helpo-domojn, amasigante nebezonan monon sur la doloron de la proksimulo;

tiuj, kiuj ekstermas infanojn en formado, garantiante la senpunecon per la silento de la viktimoj mem;

la patrinoj, kiuj, sen motivo, mutigas la trumpetojn de la vivo en la sanktejo de la propra korpo, ebriiĝante de plezuroj, kiuj kulminas ĝis frenezeco;

tiuj, kiuj malnobligas la inteligenton, vendante emociojn en la fojrejo de la malvirteco;

tiuj, kiuj dronadas sian post tuno en alkoholaĵo;

tiuj, kiuj mortigas la tempon, por ke la tempo ne donu al ili respondecon;

tiuj, kiuj pasigas la horojn kritikante la konduton de aliuloj kaj forgesante siajn proprajn devojn;

tiuj, kiuj vivas en la mondo kun ĉiuj deziroj kontentigitaj;

tiuj, kiuj ne sentas neceson labori;

tiuj, kiuj krias kontraŭ la sendankemo, ne ekzamenante la problemojn de la supozitaj sendankemuloj;

tiuj, kiuj kredas aĉeti la ĉielon, donante unu groŝon al la servoj de karitato, kaj rezervante milionojn por frenezigi la propran idaron, en inventaroj de sango kaj malamo;

tiuj, kiuj kondamnas kaj malbenas, anstataŭ kompreni kaj beni;

tiuj, kiuj perdis la simplecon kaj bezonas eburan turon por vivi en ĝi;

tiuj, kiuj fariĝas kvazaŭ balasto, malfaciligante la iradon de bonaj verkoj...

Dizertado! Dizertado! Se ni portas similan vundon, korekton por ni!...

Kaj se ni vidas ĝin en la aliaj, kompaton por ili!...

EMMANUEL
Trad.: Benedicto Silva

LA FLUTO

Aŭdu, mia koro!

En cia fluto loĝas parfuma muziko de kamparaj floroj, de heleca akvo, de trembrilantaj folioj, de la resonantaj ombroj ĉe la abelaj flugiloj.

La fluto ŝtelas, el la dolĉaj lipoj de mia amiko, lian rideton kaj ĝin verŝas sur mian vivon.

Rabindranath Tagore.

El la Evangelio laŭ Spiritismo

Mia Regno ne estas el tiu ĉi Mondo

II-a ĈAPITRO

SURTERA REĜECO

Kiu pli bone ol mi povas kompreni la verecon de ĉi tiuj vortoj de Nia Sinjoro: "Mia regno ne estas el tiu ĉi mondo?" La malhumileco pereigis min sur la tero; kiu do komprenus la neniecon de la regnoj en tiu ĉi mondo, se mi tion ne komprenus? Kion mi kunportis el mia surtera reĝeco? Nenion, absolute nenion; kaj kvazaŭ por igi pli terura la lecionon, ĝi ne sekvis min ĝis la tombo! Reĝino mi estis inter la homoj, kiel reĝino mi opiniis eniri en la regnon de la ĉieloj. Kia elreviĝo! kia humiligo, kiam, anstataŭ esti ricevita kiel suverenino, mi vidis pli alte ol mi, ja multe pli alte ol mi, homojn, kiujn mi juĝis tre malgrandaj kaj kiujn mi malŝatis, ĉar ili ne havis nobelan sangon! Ho! tiam mi komprenis la senutilecon de la honoroj kaj de altaj rangoj, kiujn oni serĉas kun tiom da avideco sur la tero!

Por prepari al si lokon en tiu regno, estas necesaj la abnegacio, la humileco, la karito en sia tuta ĉiela praktikado, la bonvolemo por ĉiuj; oni ne demandas al vi pri tio, kio vi estis, kian rangon vi okupis, sed pri la bono, kiun vi faris, pri la larmoj, kiujn vi forviŝis.

Ho! Jesuo, ci tion diris, cia regno ne estas el tiu ĉi mondo, ĉar estas necese suferi por alveni al la ĉielo, al kiu la ŝtupoj de trono kondukas neniun; nur la plej penigaj vojetoj de la vivo tien kondukas; serĉu do la vojon tra rubusujoj kaj la dornoj, kaj ne inter la floroj.

La homoj kuras post la surterajn bonaĵojn, kvazaŭ ili devus konservi ĉi tiujn por ĉiam; sed tie ĉi ne plu estas iluzio; ili baldaŭ konstatas, ke ili kaptis nur ombron, kaj neglektis la solajn bonaĵojn solidajn kaj daŭrajn, la solajn, kiuj utilas povas malfermi la ĉielan enirejon.

Kompatu tiujn, kiuj ne gajnis la regnon de la ĉielo; helpu ilin per viaj preĝoj, ĉar la preĝo alproksimigas la homon al la Plejaltulo; ĝi estas la ligilo inter la ĉielo kaj la tero; ne forgesu tion. (Unu el la Reĝinoj de Francujo. Le Havre, 1863.)

Trad. de Prof. Iŝmael Gomes Braga

Legu Kaj Vastigu: Spiritismaj Esperanto-Grupoj

Spiritisma Grupo EEE
Caixa Postal 507
BELO HORIZONTE, MG

Spiritisma Esperanto-Grupo
Caixa Postal 206
UBERLÂNDIA, MG

Grupo Esperanto kaj Paco
Rua Bernardo Cisneros, 12-Parque Riachuelo
BELO HORIZONTE, MG

Grupo Esperanto kaj Frateco
Caixa Postal 369
BAGÉ, Rio Grande do Sul

Grupo de la Frateco EEE
R. Carlos de Souza Nazareth, 184, apt. 82
SÃO PAULO, SP

ATENTU! - La Redakcio antaŭdankas ĉiujn informojn pri esperantista aktiveco ĉe spiritismaj junularoj, pri grupoj funkciantaj laŭ ĉi-supre menciite, pri laboroj de esperantistoj-spiritistoj en junularaj koncentrigoj efektivigitaj (-ataj, -otaj). Estas necese, ke ĉiu kunlaboru siaflanke por pli efika disvastigo de Spiritismo inter Spiritistoj. Ĉiuj informoj estos kore akceptata. Helpu nin laŭeble!

— SERVANTOJ —

Ĉiam ekzistas multaj servantoj, malgraŭ la granda nombro da senokupaj manoj.

Tamen estas servantoj, kiuj laboras kun neglekto.

Servantoj, kiuj ne havas konscion pri pli granda produktado.

Servantoj iluziitaj en falsaj laboroj.

Servantoj trompitaj de tiuj, kiuj konstruas minimumon da vero per maksimo da iluzio.

Tiel ne gravas nur agi. Estas necese scii, kiam, kiel kaj kie agi.

Ne sufiĉas nur bonvolo; urĝas al ni saĝo, ke la taskoj produktu pli.

Tiamaniere ni vidas du tipojn de servantoj sur la Tero, nome ordinaraj servantoj kaj servantoj de la Sinjoro (*).

Ordinara servanto ne lernas.

Servanto de la Sinjoro penas lerni pli kaj pli.

Ordinara servanto postulas.

Servanto de la Sinjoro helpas.

Ordinara servanto pledas por rajtoj.

Servanto de la Sinjoro vivas atenta pri la plenumado de siaj propraj devoj.

Ordinara servanto ne esploras siajn personajn eblojn.

Servanto de la Sinjoro atentas sin mem por pli bone kunlabori.

Ordinara servanto lokas sian "memon" super ĉia agado.

Servanto de la Sinjoro metas bonon por la aliaj super la sian.

Ordinara servanto fiaskas en malfacilaj horoj.

Servanto de la Sinjoro nelaceble persistas.

—

Ni do vidu, kia tipo de servanto ni estas ĉe la fido, kiu subtenas nian koron, konvinkiĝinte, ke ni en la servo de bono ĉiam povas doni pli favore al la aliaj.

JOHANO MODESTO

(Mesaĝo ricevita per la mediumo Waldo Vieira. Trad. AKACO.)

(*) Dio. La Trad.

Neceso de la Socia Vivo

766. Ĉu la socia vivo troviĝas en la naturo?

"Certe; Dio kreis la homon, por ke ĉi tiu vivu en socio. Li ne senutile dotis la homon per parolo, kaj per ĉiuj aliaj kapabloj necesaj al la vivo de interrilato."

767. Ĉu la absoluta izoleco kontraŭas la leĝon de la naturo?

"Jes, ĉar la homoj instinkte deziras socion, kaj ĉiuj devas kunlabori por la progresado, per reciproka helpo."

768. Ĉu la homo, dezirante socion, nur obeas personan senton, aŭ ĉu en tiu sento estas pli ĝenerala providenca celo?

"La homo devas progresi, kaj tion li sola ne povas fari, ĉar li ne posedas ĉiajn kapablojn; li bezonas la kontakton de aliaj homoj. En izoleco, li brutiĝas kaj velkas."

Neniu homo havas kompletajn kapablojn; per la socia kolektigo la homoj sin reciproke kompletigas, por certigi al si bonfarton kaj por progresadi. Ili havas reciprokajn bezonojn, kaj tial ili estas destinitaj vivi ne izole, sed socie.

(El la Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, traduko de Prof. Porto Carreiro Neto).

II-a Kunfratigo de Spiritismaj Junularoj de "Triângulo Mineiro"

(II COMETRIM) - Kun plezuro ni publikigas en esperanta traduko la cirkuleron pri la "2-a Kunfratigo de Spiritismaj Junularoj de Triângulo Mineiro", kiun sendis la Sekretario, Prof-o Elam Fonseca, agema spiritisto-esperantisto, delegito de U.E.A. kaj unu el la estraranoj gvidantaj la "Ginásio Esperança"-n ĉe la urbo Tupaciguara en tiu regiono de ŝtato Minas Gerais:

Estimata Frato,

Ĝoje ni vin kore sciigas pri la efektivigo de la "II-a **Kunfratigo de Spiritismaj Junularoj de Triângulo Mineiro**" okazonta dum la 30/31 -a de Oktobro kaj 1/2-a de Novembro 1965 en la urbo Tupaciguara kun celo pliampleksigi la spiritisman movado ĉe gejunuloj de tiu ĉi vasta regiono de ŝtato Minas Gerais.

II-a Antaŭkunsido ĉe urbo Prata - Laŭ cirkulero n-ro l, okazos en la urbo Prata la 28/-29 an de tiu ĉi fluanta monato Aŭgusto, sub la subteno de la spiritisma Prata-familio la "II-a Antaŭkunsido" de la anoncita "II-a Kunfratigo de Spiritismaj Junularoj de Triânglo Mineiro", kiam tre gravaj temoj estos pritraktitaj de la Direktora Konsilantaro konsistanta el reprezentantoj de la diversaj departementoj de Spiritismaj Junularoj kaj de Spiritismaj Komunumaj Aliancoj el la norda kaj suda regionoj en Triângulo Mineiro.

Nombro da Partoprenontoj por la "II-a Antaŭkunsido" - Ĉiu Junularo rajtas sin reprezenti per ĝis maksimume tri (3) reprezentantoj, kiuj devas esti nepre akompanataj de la respektiva kreditletero.

Grava rezolucio - La Direktora Konsilantaro petas de ĉiu partoprenanto de la diversaj komisionoj (Socia Helpado, Programado de Studoj, Evangeliigo de Infanoj, Organizado de Junularoj kaj Doktrinigaj Testoj), ke ili ĉeestu la "II-an Antaŭkunsidon" en la urbo Prata cele kunlabori por la aprobo de la programo koncerne al la laboro farota de la respektivaj komisionoj.

Parolado dum la "II-a Antaŭkunsido" - Kiel estis decidite, okazos en la 28-a Aŭgusto, sabate, parolado pri doktriniga temo, kiun faros la klera junulo Argemiro Evangelista Ferreira el la urbo Uberlândia.

Laborprogramo por Ekspoziciistoj - Oni sciigas, ke dum la "II-a COMETRIM", la Komisiono por programado de studoj prezentos laborprogramon por Ekspoziciistoj, kiu celos pritrakti pri la profitigo de gejunuloj en la tasko plivastigi la doktrinaĵon spiritisman.

Averteto - " - Junulo: studi por lerni; lerni por labori; labori por servi ĉiam plu." (Andreo Ludoviko).

Fratajn Salutojn

La Direktora Konsilantaro de la "II-a COMETRIM"

Elam Fonseca
Sekretario

Poŝtkesto 95 —Tupaciguara, MG.

SENDU AMON

Ne estis al mi kreita la amo kiu ne konas sintenojn, kaj estas kiel la ŝaŭmanta vino diskreviganta sian botelon, kaj subite perdiĝas.

Sendu al mi freŝan kaj puran amon, kiel Via pluvo kiu benas la soifantan teron kaj plenigas la argilan kruĉon de mia hejmo.

Al mi sendu la amon kiu penetras en la fundon de la koro kaj el ĝi disvastiĝas kiel la nevidebla suko, tra la diversbranĉa arbo de l' vivo nutranta fruktojn kaj florojn.

Al mi sendu la amon, kiu konservas trankvila la koron, en pleneco de senlima paco.

Rabindranath Tagore.

(El la Verko Esperanto - Editôra Fraternidade)

NEW YORK - Nun Centro por Disvastigo de Mesaĝoj Mediumaj

Verkis Irmão Saulo, "O Caminho", jaro XVIII, n-ro 455, 15.8.65, Guaxupé, MG.

La misionera vizito de Francisco Cândido Xavier kaj Waldo Vieira en Usonon bonege fruktoriĉas. Pri tio oni ĵus ricevis la jenan telegramon: "Plezuron sciigi estimatan amikon pri la efektivigo de kontrakto por publikigo de "Ideal Espírita" (Spiritisma Idealo) pere de Philosophical Library, grava eldonejo en New York, kaj pri fondado de "Christian Spirit Center of the United States", kune kun lanĉo de la unua aro de la ricevitaj mesaĝoj rekte skribitaj en angla lingvo. Dio estu laŭdata. Laŭdon al la Spiritisma Doktrino. Ĉirkaŭbrakojn. Chico kaj Waldo."

La unuaj mesaĝoj rekte ricevitaj en angla lingvo pere de la du mediumoj Francisco Cândido Xavier kaj Waldo Vieira, respektive okazintaj vespere dum laborkunsidoj en la 12-a kaj 14-a de Julio estas titolitaj "Laboru kaj havu fidon" kaj "Vi kaj la Reenkarniĝo". Ambaŭ mesaĝoj estas subskribitaj de spirito Ernest O'Brien kaj estas verkitaj en perfekta stilo, neta kaj kerneca, elstarante altkvalitan beletristikon. Kiel dirite de brazila tradukisto al kiu oni submetis la mesaĝojn, ili estas nur pro tio konsideritaj "gravege konvinkigaj."

La usona Spiritismo kaŭze de la tiea malvastigo de la verkoj de Allan Kardec malsame disvolviĝis kaj fariĝis eklezio kun temploj kaj pastoroj. Malgraŭ tio, kardecismo progresis en aliaj medioj en tiu lando kaj estis pli bone akceptita ĉe tiea loĝantaro el Porto-Riko. La ĉefa instiganto de la kardecista movado estas Victor S. Buttler. Tiu movado konsistiĝas el reto de 12 spiritismaj centroj en plena aktivecoj dislokitaj en la urbo kaj ŝtato New York. En ŝtato Florida la pioniro por la kardecista movado estas Prof-o Luiz G. Ovalle, en Miami.

F-ino Hazel Morris el Shrevenport, ŝtato Louisiania, estas la tradukisto de la verkoj de Francisco Cândido Xavier kaj Waldo Vieira por la angla lingvo. Pere de la Kristana Spiritisma Centro de New York, la mesaĝoj de tiuj du brazilaj mediumoj same estas publikigotaj laŭ konstantaj eldonaĵoj kaj, kiel sciate, "Psychich News" en Londono baldaŭ sendos al Usono la unuajn volumojn de "La Libro de la Spiritoj" en angla lingvo el la brazila eldono de Librejo Lake, São Paulo.

Tradukis W.

SEPTEMBRO 1965
2-a Jaro N-ro 4

Esperanto - Aldono

Senpaga presaĵo flugfolie disdonata pomulte al spiritismaj gazetoj por propagando de Esperanto-Movado

—o—

Oficiala Organo de

— Grupo Esperanto kaj Frateco —
Av. General Osório, 1737 - C. Postal 369
BAGÉ - Rio Grande do Sul - BRASIL

—O—

Respondeca Redaktoro
CARLOS DE ALMEIDA WUTKE
Redaktorestro
JOÃO SEVERO
Sekretarioj
PEDRO ELIAS DIAS
JOSÉ CORREIA
ZAIRA LEAL
Direktoro Eldonanto
PAULO GUILHERME

Ĉion pri redaktado kaj korespondo de "Esperanto-Aldono" sendu rekte al Respondeca Redaktoro, Caixa Postal 206, Uberlândia, MG, Brasil. Manuskriptoj estu tajpitaj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj iom larĝa marĝeno. Traduko kaj represo de artikoloj kaj redaktaĵoj estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton. "Esperanto-Aldono" estas ricevebla laŭ peto. Tekstoj subskribitaj aperas ekster la respondeco de la Redakcio. Ricevas: "Orientador", Rua Cap. Eleutério, 398, Passo Fundo, R. G. do Sul.

La Tempo

ANDREO LUDOVIKO

Ĉiuj personoj ĝuas la tempon - malmultaj ĝin utiligas.

Kuras la oportuneco dissendanta benojn.

La homo sin trenas - difektanta donacojn ricevitajn.

Ĉiu tago estas lando - kun dudek kvar provincoj.

Ĉiu horo estas provinco - kun sesdek provinceroj.

La homo, tamen, estas semisto - kiu ankoraŭ ne vekiĝis.

Distre la kulturisto demandas: - Kion mi faros?

Kaj la tempo, silente, respondas per benataj oportunecoj:

por ke li servu - gajnanta aŭtoritaton,
por ke li obeu - konkeranta la mondon,
por ke li luktu - suprengrimpanta la ĉielon.

La homo, tamen, volonte blinda,
petegas pli da tempo - por moki la vivon,
ĉar se li obeas - fiere ribeliĝas,
se li suferas - ofendas kaj blasfemas.

Sciencistoj - fuĝas de la vera scienco.
Filozofoj - ne sekvas siajn instruojn.
Religiuloj - neas la religion.

Servistoj de la popolo - laboras por la propraj interesoj.

Laboristoj - eskapas de la laboro.

Ĝuantoj nedaŭraj - surtronigas iluziojn.

Posedas la mondaĵojn - sed finfine restas poseditaj.

Pledas por la libero - submetiĝante al sklaveco.

Tamen alvenas tago - ĉar ĉiam estas unu pli klara ol la aliaj, kiam ekaperas la morto - postulanta eluzitajn ŝtofojn...

Tiam, la tempo kolektas rapide - la nenombreblajn oportunecojn...

Kaj la homo rekonas - malfrue priokupita,
ke la senfina Eterneco - postulas kontojn,
eĉ pri la minuto.

(El la Kurso de Esperanto - Editôra da Fraternidade)